

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2022

Jarkolekto 9 – Numero 4



ENHAVOTABELO

de oktobro 2022

Titolpaĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj:	5
<i>Josip Broz Tito (1892-1980)</i>	
<i>Veterana honora medalo de LA VERDA STELO (1965)</i>	
<i>25-jara jubileo Kraków 1912</i>	
<i>Honora medalo por Vlastimil Kočvara (°1936)</i>	
Por spuremuloj! “Arta Esperantista Signeto”	13
Aspektoj de numismatiko: portretmedalo honore al Loek Boezelijm (1937-2018)	15
Valormarkoj & valorbiletoj: polikromia loteria bileto el 1908	17
Medalistoj: 31. Joseph Witterwulge (1883-1967)	19
Historiaj aspektoj: Gerard Debrouwere (1901-1991)	20
Spikumajoj & suplementoj: anonco pri la respondkupono de 1926	21
Terminaro: alfabeto listo (31)	22
Numismatika forumo: ĉu baldaŭ la definitiva kraŝo de la kripta mono?.	23
El la gazetaro	25
Retpoŝto	28
Anoncoj & eventoj	35

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: <http://ena.frali.bplaced.net>
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

“En volontula movado kiel la nia, se oni havas bonan ideon, oni devas esti preta mem labori por realigi ĝin. Estas senutile esperi, ke iu alia faros!”

Anna Löwenstein



Per ĉi kvara numero ENA kompletigas la naŭan jarkolekton de la fakgrupa organo “Esperanta Numismatiko”. Kvankam la asocio mem estis jam fondita en 2012, la historio de la revuo komenciĝis en januaro 2014. Do, en 2024 ENA jubilee rememorigos la unuan jardekon de la unua numismatika faka revuo en la historio de Esperanto.

Post dek jaroj do venontan jaron ekaplikiĝos la fazo de la intensa preparado de du gravaj kaj tute novaj kreaĵoj, provizore nomataj la “UNUA NUMISMATIKA NOMENKLATURO en Esperanto” kaj la “ENCIKLOPEDIA KATALOGO de ESPERANTAJ NUMISMATIKAĴOJ”. Ni senhezite jam nun petas niajn legantojn kaj aliajn simpatiantojn proponi alternativajn, eble multe pli taŭgajn, titolojn por tiuj preparandaj kaj verkendaj ENA-eldonaĵoj.

Alia temo de ĉi rubriko estas la pasinta Universala Kongreso en Kanado, kies organizintoj pro la pandemio en la aranĝi ciferecan tradicia UK, evidente ENA kaj membroj de (LKK) tre pozitive unuan kanadan UK-



emfazi, ke nia samideano Garry Evans, LKK-ano, jam en 2020 skizigis belegan desegnon por krei tiun memormedalon. La pandemio, la internacia ekonomia situacio kaj la distanco al la kongreso tamen ne allogis amason da esperantistoj. Do la LKK, pro neceso kaj prave, per nuligo de la medalprojekto decidis eviti financon fiaskon. Evidente, por ĉiuj ĝisostaj numismatoj jen malagrabra elreviĝo, tamen prudenta kaj justa decido de niaj kanadaj samideanoj! Eble tiu skizo tamen iam estos uzebla kaj adaptebla por estonta UK en Kanado. Jen niaj sinceraj espero kaj deziro!

Kiel kutime ni deziras, ke la enhavo de la rubrikoj en la kvara numero de 2022 respondos al la atendoj de nia kara legantaro. Dume ni jam ekpripensis, kiel pli bone aranĝi la unuan numeron de la jubilea jarkolekto, por daŭre dorloti la fidelajn membrojn kaj allogi novajn legantojn...

Bert



En 1948 okazis rompiĝo kun Sovetunio. Kiam Stalin obstine persistis, ke Jugoslavio liberiĝis dank'al Sovetunio, marŝalo Tito, iama partizano kontraŭ la faŝismaj “hordoj” kaj poste prezidanto de la Ekzekuta Federacia Konsilo de Jugoslavio respondis, ke la lando liberigis sin mem. Tito, ekde tiam sendepende de SU kaj de la “kapitalismo”, elektis la direkton “jugoslava tria vojo”. Tial li provis sekvi sendependan “socialisman” vojon por sia patrujo.

Laŭ “Esperanto en Perspektivo” Tito “*iam lernis la Internacian Lingvon kaj ofte esprimis sin favore al ĝi*”. Li almenaŭ estis alta protektanto de la Universala Kongreso 1953 en Zagrebo kaj de la UK 1973 en Beogrado.

En la libro “Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj” Isaj Drawter citas Titon per jenaj vortoj: “*Mi lernis Esperanton en malliberejo. Mi lernis Esperanton, sed dum mallonga tempo. La lernado estis facila. Mi komprenas bone, nur se vi malpli rapide parolas. Mi jam legis sufiĉe bone, sed ne havis okazon konversacii. Esperanton mi efektive lernis nur dum kelkaj monatoj kaj, mi devas konfesi, mi lernis ĝin tre facile.*”

En “Ondo de Esperanto” de la 31a de aŭgusto 2013 Zlatko Tišlar en artikolo lin nomis “*Nia Trezoro: Josip Broz Tito*”.

Fonto: Vikipedio



“Jaro de internacia kunlaboro” en 1965. Kunveno de jugoslavaj esperantistoj.

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo B1 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj rilate al Esperanto

Josip Broz Tito (1892-1980)



Lando: Jugoslavio

Metalo: oro (.900) polurita

Diametro: 38 mm

Jaro: 1979

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 29,5 g

Medalisto: *serĉata*

Valoro: 5 000 dinaroj

Averso:

ĉirkaŭe: “JOSIP BROZ TITO-POKROVITELJ VIII MEDITERANSKIH IGARA
• SPLIT 1979 •”

meze: silueta busto de Tito tute maldekstren

Reverso:

ĉirkaŭe: “•SFR JUGOSLAVIJA-COP JYTOC JYTOC JYTOC•
ДИНАРА DINARJEV 5000 DINARA ДИНАРИ”

supre: la landa blazono / 1978 / signoj / centra urba pejzaĵo + “SPLIT”

Rimarko 1:

monero eldonita okaze de sporta evento “Mediteraneaj Ludoj” 1978.

Rimarko 2:

la tiama jugoslava nacia blazono.



Rimarko 3:

SFR JUGOSLAVIJA = Socialisma Federacia Respubliko Jugoslavio.

Rimarko 4:

en 1928 Tito fariĝis sekretario de la (malpermesita) komunista partio de Zagrebo kaj trapasis kvin jarojn en prizono, kie li estus lerninta Esperanton.



La ĉirkaŭaĵo de la katedralo de Split

Tipo B2 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj kun esperantaj aldonoj

Veterana honora medalo de LA VERDA STELO (1965)



Lando: Belgio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: arĝentita bronzo

Pezo: 167 g

Mezuroj: 73 x 67 mm

Medalisto: J. Witterwulghe

Jaro: 1965

Diko: 4 mm

Averso:

bildo: reliefa bildo de aktratrita laborista figuro, ekmovanta rokan plategon

eta surskribo: dekstre, vertikale nomo de la artisto-medalisto J. Witterwulghe

Reverso:

surskribo gravurita, kiu montras la koloron de la bronza fundo:

AL NIAJ VETERANOJ / S-ro August FAES / La Verda Stelo / 17 . I . 1965

Rimarko 1:

kvankam la medalo estis kreita ĉirkaŭ 1965, la stilo estas tia, kia la stilo de art déco (artdekorata stilo) el la jaroj 1920-1936. La troigita muskolaro emfazas la streĉadon.

Rimarko 2:

eldonkvanto: la surskribo “al niaj veteranoj” indikas, ke la plej fidelaj membroj ricevis ekzempleron de ĉi tiu medalo. *La ekzakta kvanto estas serĉata.*

Rimarko 3:

la medalisto estis famega skulptisto kaj medalisto. Jen alia el liaj medaloj en la sama stilo.



La Verda Stelo: nova starto post la 50a jaro

Kiam - okaze de la orjubileaj festoj de la *La Verda Stelo* - vicprezidanto Henri Sielens verkis libreton en kiu li skizis la grupan vivon inter 1932 kaj 1957, li reliefigis la personon de la tiama prezidanto s-ro Maurice Jaumotte, kiu, samtempe kun la grupa jubileo, festis sian 30-jaran prezidantecon de *La Verda Stelo*.

S-ro Sielens ankaŭ speciale atentigis pri la fakto, ke post malfacila periodo tuj post la Dua Mondmilito, la grupa vivo nur tre malrapide reprenis sian aktivecon. Nur post sukcesplenaj kursoj, gviditaj de s-ro Jaumotte en la urba lernejo en *Belgiëlei*, unuflanke, kaj de **s-ro August Faes** en lia butikoj *De Schoenmarkt* aliflanke, la nova generacio forte influis la evoluon de la grupo.

La 50-jara ekzistado ne estis nur mejloŝtono en la grupa vivo, sed samtempe ankaŭ la starto de aktiveco sur ĉiuj terenoj.

Pri tio zorgis modela estraro, konsistanta el Maurice Jaumotte, prezidanto; Henri Sielens, vicprezidanto; Morris De Ketelaere, **August Faes**, Gustave Vermandere kaj Hector Vermuyten, emeritaj kaj honoraj vicprezidantoj; Jules Verstraeten, sekretario; René Balleux, kasisto; Elza van der Weken, helpsekretariino kaj protokolantino; Lisette de Winter, festestrino; Lea Bernaerts, helpa festestrino (kaj punkasistino!); Roger Jaumotte, gazetara sekretario; Jozef Montmirail, tehnikisto; Blanche Geers, Helena kaj Mathilde Hofkens, Karel Ameryckx, Adhemar Verhoeven, Georges van den Bossche kaj Jozef Vinck, membroj; Henny Jacques kaj Pierre Taeye, Esperanto-instruantoj.



August Faes

Tipo D1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

25-jara jubileo Kraków 1912



Lando: Pollando

Metalo: bronzo

Jaro: 1912

Diametro: 30 mm

Mezuroj: 25 x 25 mm

Kvanto: *serĉata*

Pezo: 8,56 g

Medalisto: Henryk Kunzek

Diko: 2 mm

Averso:

meze: nudulino kvazaŭ sidante sur globo kun ambaŭflanke flugilo

supre: super la kapo ambaŭ manoj en la direkto de kvinpinta steleto

maldekstre: "VIII UNIVERS. KONGRESO ESPERANTISTA"

dekstre: "XXV JARA JUBILEO KRAKÓW 1912"

sube: "Henryk Kunzek"

Reverso:

firmao-stampo: "GLASER & SOHN DRESDEN"

Rimarko 1:

la koloro de jena foto sugestas, ke eble ekzistas ankaŭ ekzempleroj arĝentaj aŭ arĝentitaj. *Ekzemplero serĉata.*



Rimarko 2:

por la jubilea jaro 1912 la sama firmao do kreis almenaŭ du diversajn medalojn, post la eldono de memoriga medalo por la Universala Kongreso en Antverpeno en la jaro 1911.



UK Antverpeno 1911
Vidu ankaŭ: jk.8 n-ro 4



25a jubileo de Esperanto 1887 - 1912
jk.5 n-ro 3

Rimarko 3:

pri la medalisto Henryk Kunzek ni jam publikigis en la rubriko "Medalisto" artikolon *en la tria numero de la naŭa kolekto.*

Rimarko 4:

la firmao-stampo kaj la pendigileto ambaŭ apartenas al la medalo, t.e. ili estis inkluditaj en la originala skizo. Ekzempleroj sen pendigileto ne estas konataj.

Rimarko 5:

la medaleto klare montras la stilon de *art déco*, kiu venis post la kulmino de secesio.

Tipo B2 - Ne-esperantaj moneroj kaj medaloj kun esperantaj aldonoj

Honora medalo por Vlastimil Kočvara (°1936)



Lando: Ĉeĥio

Kvanto: 40

Metalo: zinko (patinita)

Pezo: 57 g

Diametro: 60 mm

Medalisto: Jiří Hromada

Jaro: 2021

Diko: 3,7 mm

Averso:

supre: “k85.narozeninám” (= al 85a naskiĝdatreveno)

meze: busto de Vlastimil Kočvara kaj sub la kolumo la signo de la medalisto (jh)

sube: surskribo: Ing. (= *Inĝeniero*) Vlastimil Kočvara, 12.4.1936 (*naskiĝdato*), čestný člen ČNS (= *honora membro de la Ĉeĥa Numismatika Asocio*)

Reverso:

maldekstre: blazono de Silezio sur simbola medaleto; sub ĝi simbola poŝtmarko kun Esperanto-stelo

ĉirkaŭe: “ČESKÁ NUMISMATICKÁ SPOLEČNOST - POBOČKA OPAVA” (= *Ĉeĥa Numismatika Asocio, filio Opava*)

Rimarko 1:

la skizo de la honora medalo:



Rimarko 2:



Sinjoro Kočvara multajn jarojn aktivis kiel filatelisto kaj numismato kaj krome kiel sekretario de la organizaĵo “Matice slezská”, patriota komunumo, kiu prizorgas la tradiciojn de Silezio. La insigno de tiu komunumo estas la blazono de Silezio.

Sinjoro Kočvara antaŭ nelonge iĝis la 155a individua membro de ENA.

Rimarko 3:

Opava (germane Troppau) estis ekde la dektria jarcento memstara princolando apartenante al la ĉeĥa reĝlando, ekde la deksepa jarcento ĝi apartenis al la Habsburga monarkio. La regiono estis nomata Silezio.

Post la divido inter Prusio kaj la Habsburga monarkio (1742) ĝi estis la ĉefurbo de la parto apartenanta al la Habsburga monarkio. Tiun rolon ĝi ludis ĝis la dudeka jarcento, ĝis en la jaro 1929 la nova ŝtato Ĉeĥoslovakio nuligis la silezian landon kaj aligis ĝin al Moravio.



La redakcio de ENA tutkore dankas sinjoron Vlastimil Kočvara pro la informoj pri la medalo.

POR SPUREMULOJ!


“Arta esperantista signeto”

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. Ĉu vi povas helpi nin?

XXIVa enigmo

La ĉi-sube montratan platon ni jam priskribis *en jk.8 n-ro 1 p.5*. Ĝi enhavas ankoraŭ multe da sekretoj. Aktuale tamen montriĝas, ke ĝi ne nur ekzistis kiel plato (150 mm x 110 mm / 84,17 g), sed ankaŭ kiel t.n. “juvelsigneto”, laŭ termino de la eldonisto.

Antaŭ nelonge retrovita poŝtkarto, reklamcele eldonita en aŭ eĉ antaŭ 1907, jam iom klarigas ĝis nun nekonatajn faktojn, sed samtempe elvokas novajn demandojn, kio ja daŭre okazas en ĉiuj branĉoj de la scienco! Certas almenaŭ, ke tiu numismatikaĵo jam ekzistis en 1907.



Sur la bildkarto ĝi estas nomata “arta esperantista **signeto**”. Stranga ŝajnas la perifrazo “signeto”, ĉar la mezuroj de la konata **mangranda** plako TUTE NE aspektas kiel porroversa pinglo!

Averse sur la karto ni legas dekstre: “**JUVELSIGNETOJ/Reala amplekso kun verdemajlita stelo (pingloj, broĉoj aŭ pendaĵetoj)**”. Ĉu “reala amplekso” indikas, ke la du fotetoj dekstre, kun ciferoj 1 kaj 2, montras la realajn mezurojn de du diversaj etaj tipoj de la sama objekto?

Interese estas krome la detaloj pri la uzitaj materialoj kaj la vendoprezoj:

- El arĝent[it]a bronzo	tipo 1: 1,50 [frankojn]	tipo 2: 3,00 [frankojn]
- El kontrolita arĝento	tipo 1: 3,00 [frankojn]	tipo 2: 6,00 [frankojn]
- El arĝento + orum. rondo	tipo 1: 4,00 [frankojn]	tipo 2: 7,00 [frankojn]
- El oro (18 karatoj)	tipo 1: 40,00 [frankojn]	tipo 2: – [frankojn]

Eldonisto, juvelisto: **ROBERT ENAULT**
41, rue Turbigo, PARIS



Demandoj:

1. Ĉu la jam priskribita, plaka tipo eble estis provekzemplero? Vidu fotojn tute sube...
2. Ĉu la pejzaĝo kun lumturo estas reala aŭ fantazia? Ĉu ie en Francio?
3. Ĉu la eldonisto estis esperantisto, kiu memstare aldonis kvar versojn el “poemo” de Zamenhof, sugestatajn per la aldono de ties subskribo, aŭ ĉu pri tio decidis iu komisiinto? La tekst(fragment)o tamen ne troviĝus en la verkaro de Zamenhof!
4. Ĉu iu el vi povas havigi al ENA informojn pri iu (franca) medalisto A. FLINOIS?



Ĉi artaĵo gajnis arĝentan medalon dum franc-brita ekspozicio en Londono 1908!

EK AL ESPLORADO, FRANCAJ KAJ ALIAJ ENA-MEMBROJ!!! ANTAŬDANKON!

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Portretmedalo honore al Loek Boezelijn (1937-2018)

La nomo Loek Boezelijn [luk buzelejn] estas konata ĉe numismatoj pro lia artikola serio “Nekonata, neamata” en la nederlanda faka revuo “De Beeldenaar” (= La Monerfiguro).

La edzino de la aŭtoro de ĉi suba artikolo, medalistino s-ino Carla Klein (ambaŭ iamaj gekonatuloj de Boezelijn), petita post lia morto de liaj filinoj fari portretmedalon, kreis la medalon kiu estas la temo de ĉi artikolo, unue aperinta en la nederlanda numismatika revuo “MUNT-koerier”.



Loek Boezelijn. 80 mm, bronzo, 2021. Carla Klein

Carla Klein ofte aŭdas la demandon: “Kiel oni faras medalon?” Ĉi-sube tiu demando ricevas respondon, ilustritan paŝon post paŝo.



Unuavice la artistino kolektis fotojn de Loek kaj faris de ili serion de etaj skizoj laŭ realaj mezuroj, proksimume ok centimetrojn, el kiuj du estis elektitaj, kaj por la averso kaj por la reverso.



La aversa flanko montras la portreton de Boezelijn, dekstren kaj rigardanta atenteme antaŭen, kvazaŭ li observus vin rakontante ion al vi. La familio petis aldoni propran, originalan desegnon far Loek kaj fone velŝipon, muelilon kaj preĝejon. Supre-rande troviĝas steloj kaj lunarko. Por la reversa flanko Carla estis petita aldoni cikoniojn, ĉar Loek naskiĝis en la urbo Hago. Klein prilaboris tiun detalon per birdoj ĉe rando de fosajfo, kiuj perbeke indikas lian nomon.

Post la aprobo de la familio, ŝi transmetis la detalojn unu post la alia sur modlovakson. Tio estis longdaŭra proceso, ĉar la dezajnistino kutime ne tuj estas kontenta kaj ŝi daŭrigas perfektigi ĝin ĝis la rezulto vere plaĉas al ŝi. Kiam la vaksa modelo estas aprobita, ŝi surverŝas ĝin per gipso, tiel ke ekiĝas du gipsaj supraĵoj. Dum la sekigado eventualaj aerveziketoj estas senigataj.



La vaksmodelo



Verŝi la gipsajn supraĵojn



La gipsaj supraĵoj estas pretaj

La gipsaj supraĵoj estas “negativaj”, sed ili aspektas kvazaŭ la portreto estus reliefa; jen aldona efiko de la lukto inter lumo kaj ombro. Kiam la supraĵoj estas tute sekigitaj, argilo estas premata inter la supraĵojn kaj tiel ekestas argila medalo. Ĝi estas prilaborata dum la sekiga proceso ĝis la medalistino kontentiĝas. Kiam la argila medalo estas tute seka, ĝi estas bakata en ceramikforno. Tiel aperas terakota modelo. Ĝi estas la fina, t.n. patrino modelo, kiu estas multe malpli delikata ol la nebakita argilmodelo.



La efiko de lumo kaj ombro

Sur la labortablo de Clara klare oni vidas la instrumentaron, uzatan dum la kreiva proceso. Finfine la terakota modelo estas sendata al la bronzverŝisto.



La labortablo de Carla Klein



La terakota modelo

Bedaŭrinde, dum la kreado Clara ricevis la tristan anoncon, ke Nel, la edzino de Loek, ankaŭ forpasis, tiel ke ŝi neniam vidis la pretan portretmedalon.

Carla Klein per ĝi realigis sian 90-an tiel faritan medalon. Kroma rezulto estas, ke la medalo povas stari sendepende kaj ke ĝi estas tuŝebla memoraĵo honore al neordinara homo.

Verkis kaj fotis Arnold Nieuwendam

Tradukis kaj prilaboris Bert Boon

Bibliografio:

- Boezelijn, L. *Relaas van vijftwintig jaar Koninklijk Nederlands Genootschap voor Munt- en Penningkunde* (2017). Uitgeverij Peeters, Herent, België
- Lingen, J. *In memoriam Lodewijk (Loek) Boezelijn*. (2019). *De Beeldenaar* jan/feb 2019 jg 43 21-22

La redakcio de ENA sincere dankas Carla Klein kaj Arnold Nieuwendam pro la permeso uzi la artikolon.

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Polikromia loteria bileto el 1908



Priskribo:

mezuroj kaj aspekto de poŝtkarto: 90 mm x 140 mm

supre-meze: blazono de la komunumo Nuits-Saint-Georges (Francio)

supre-flanke: branĉetoj kun vinberaroj

supre-maldekstre: sur blanka fono manskribece “Espero”

supre-dekstre: sur blanka fono manskribece “Laboro”



meze sur rubandeto: “LA VINO KONSERVAS SANON KAJ ĜOJON”

sube-meze: interplektitaj trunketoj de du vitoj kun pendigita branĉotranĉilo

sube-fone: leviĝanta suno kun abundaj radioj

tute sube: du krucforme metitaj ĝardenhakiloj; inter ambaŭ vineja heliko

subparte maldekstre: “*Memoraĵo de la 2a Federacia*

Festo organizita de “Verda

Stelo” ĉe la valetoj “Serrée”

[apud Nuits (Côte d’Or)] la

21an de Junio 1908”

subparte dekstre: verda stelo kun ena majusklo E

“*LOTERIA BILETO*

N° 87 (manfarita per stampilo / alia ekzemplero havas la numeron 810)

Sprezo: 0,15 (6 sd)”

Rimarko 1:

situo en Francio: franca komunumo situanta en la departemento Côte d’Or (= Ora Marbordo) kaj en la regiono Burgonjo-Franĉkonteo

Rimarko 2:

“Sprezo” = prezo en spesmilo (Sm)

“6 sd” = ses spesdekoj

Rimarko 3:

loka Esperanto-agado: la 21-an de junio 1908 okazis tie la dua festo de la “Verda Stelo”. En 1909 la Esperanto-grupo de Nuits organizis interŝanĝon inter du familioj. Dek-kvarjara knabo de Nuits iris al Magdeburgo (Germanio) kaj samjaraĝa knabo de Magdeburgo al Nuits.

Rimarko 4:

fama esperantistino de Nuits estis Cécile Royer [rŭaje] (1876-1957). De 1903 ŝi gvidis multajn kursojn kaj multe varbis. Vicprezidant(in)o de la “Latina Kvartalo” en Parizo, sekretariino de Presa Esperanta Societo” (1906-1914). Ŝi direktis la periodaĵon “Juna Esperantisto”. Krome ŝi verkis artikolojn kaj novelojn kaj tradukis “Johano de Bloch kaj la Muzeo de Milito kaj Paco” en “Estonta Milito laŭ la instruoj de Johano Bloch” (1907).

Fontoj: Enciklopedio de Esperanto
Vikipedio

MEDALISTOJ

31. Joseph Witterwulghe (1883 – 1967)



Jozefo Witterwulghe [vitervulge] ekstudis en la Lernejo de Belaj Artoj en Bruselo (Belgio) laŭ instigo kaj konsilo de la skulptisto-direktoro Jacques Martin. La instruisto J. Dillens direktis lin al la t.n. “ornama skulptado”, pli precize al la studo de vivantaj figuroj. Tie li finstudis en 1907.

En 1914, sendevigita koncerne armean servon, li individue laboris kaj sin dediĉis al diversaj monumentaj skulptaĵoj, krome perfektigis pri engliptiko (= tekniko por gravuro sur gemoj / kameoj). Lia monumenta laborado montras lin kiel fakulon pri la “fleksa ludo” de la homaj korpaj kurbiĝoj. Tio kontribuis al lia kreskanta famo.

Liaj preferataj temoj estis: *patrino kaj infano; juneco; saneco kaj laboro.*

Gravis ankaŭ por li la kreado de portretoj. Ne nur per skulptado sed ankaŭ per gravurado. Multaj honoraj kaj memoraj medaloj kaj plakoj kompletigas la temon de la portretoj, ofte en la tiama populara stilo de art déco.



La medalo priskribita sur p.8 de ĉi numero, ne vere estas Esperanto-medalo, do ne kreita laŭ esperantista komisiono, sed elektita de “La Verda Stelo” (Antverpeno), por honori klubajn veteranojn, per gravuritaj surskriboj reverse.

Bibliografio: Engelen – Marx: “La sculpture en Belgique à partir de 1830. Tome VII: Van der Vekens – Zomers, pp.4242-4251

La redakcio kore dankas pro abundaj informoj sinjoron Luc Vandamme, redaktoro de “Flash Medailles”, revuo de “Promocio de la medalo FIDEM”.

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Gerard Debrouwere (1901 - 1991)

Debrouwere, iama meritplena belga samideano, dum jardekoj oficis kiel UEA-delegito en la urbo Kortrejko (Kortrijk) en Belgio.

En la tridekaj jaroj li estis UEA-ĉefdelegito por Flandrio (= la nederlandlingva norda parto de Belgio) kaj senĉese li ludis gravan rolon en la organizo de la flandra Esperanto-movado. Lia batalema karaktero estis inspirado por multaj aktivuloj. Ekde la fondo de la Esperanto-grupo “La Konkordo” en 1927 li estis ĝia prezidanto, ĝis elekto kiel honora prezidanto.

En 1973 (la 25an de marto) li ricevis honoran medalon el la manoj de M. G. Dedecker, la urbestro de la nordfranca urbo Croix.



Okaze de la 1973a Esperanto-kongreso en la urbo Croix, li ricevis la ne-esperantan urban medalon (diametro: 50 mm / diko: 4 mm) kaj reciproke donis al la urbestro la urbajn insignojn de Kortrijk. Tiu simbola interŝanĝo instigis al fratiĝo inter la du urboj kaj ties Esperanto-grupoj. La membroj de la loka Esperanto-grupo decidis kaj promesis regule kunveni kun la gesamideanoj de la belga urbo, i.a. la sidejo de la famega Esperanto-biblioteko César Van Biervliet. Oni tuj konsentis kunveni estontece okaze de mondvastaj vojaĝoj kiel tiuj al la bibliotekoj de Kortrijk kaj de Roubaix. Krome pri komuna partopreno en la kongresoj de Ramsgate (Britio), Luksemburgo, Sarajevo, Belgrado k.a.



La interŝanĝo de medalo kaj insignoj. (1) Gerard Debrouwere

Fontoj: - “La Voix du Nord, mardi 3 avril 1973”
- Vikipedio

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Anonco pri la respondkupono de 1926

Esperantista Respondkupono.

Estas regula plendo de la delegitoj de UEA pri manko de aŭranko ĉe informpetoj. Dum certa tempo tiuj plendoj amasiĝis tiagrade, ke rezultis ekxiĝo de delegitoj nepovintaj pagi tiun elspezon kaj ne volintaj rifuzi informpeton. La kaŭzoj de tiu ĉi manko estas, escepte tiu de simpla sperejo flanke de l'informpetinto, la neekzisto de praktika kaj simpla pagilo. La internacia poŝta respondkupono havas kelkajn malevantaĝojn: Ne ĝenerala, havebla nur en kelkaj landoj kaj nur en pli granda oficejo, do ne en vilaĝo, cirkulado je limigita tempo, tro alta alpagito tiel ke ekzemple tia kupono kostas en Svislando 40 centimojn dum la poŝto nur redonas poŝtmarkon valorantan 30 centimojn, la kosto de 20-grams letero internacie. Malgraŭ ĉi tiuj malhelpoj la respondkupono estis multe uzita ĉe la esperantistaro; ĝi efektive larĝis pagiloj pormalgrandaj sumoj, sendebila en la korespondado. Tamen la supre diritaj malevantaĝoj, ne forgesante ankaŭ la oftan mankon de poŝta Stampo sen kiu la kupono ne estis ŝanĝebla, kaŭzis, ke post la milito la emo uzii ĝin malpligrandiĝis.

Pli malhelpo estis la valuta diferenco ŝanĝanta, kiu malsimpligis la aferon.

La ripetitaj plendoj pri la manko de aŭranko devigis nin serĉi eblecon de praktika servo, uzebla de ĉiuj esperantistoj. Regule venis proponoj pri kreo de esperantista pagilo, ĉu en formo de ĉeko, ĉu en formo de bankbileto. Zorge ekzameninte tiun eblecon ni konkludis, ke pro leĝaj kaj aliaj cirkonstancoj nek ĉeko nek bileto estas eblaj. Ĉekoj antaŭvidas krediton ĉe la centro, sekve laboron de librotendado, korespondadon kaj . . . admonadon ĉe okaza nesufiĉo de bonhevo. La spertoj de la estinta ĉekbanko instruis nin pri tio. Rilata bank-

biletojn ni ja posedas du pagilojn de malgranda valoro preskaŭ ĉie riceveblajn: Bileto de unu dolaro aŭ svisa kvinfranko. Ni ofte ricevis tiajn el landoj, de kie ni neniam estus supozintaj ricevi ekzemple svisan monbileton. Sed ne temas pri tio.

Restas solvota la problemo de simpla kaj praktika pago de 30, 50 centimoj aŭ de unu franko. Ni informas la esperantistaron, ke UEA eldonis **ESPERANTISTAN RESPONDRUPONON** laŭ suba modelo. Ĝi ne havas la malevantaĝojn de la ordinara kupono, validas dum 3 jaroj, de 1927 ĝis 1929 kaj estas ĉiam reakceptata de UEA ĝis 31 Decembro 1929. Por simpligi la skiron ni aranĝis kajeron, kiu entenas 10 biletojn po 30 centimoj, 6 biletojn po 50 centimoj kaj 3 po unu franko. La biletoj estas numerigitaj. La kajero kostas kun sendo al la mendanto 19 svisajn frankojn.*) Estas vendata nur tute kajero, ne unuopaj kuponoj. Ni konsilas al la Delegitoj, ke ili disponigu respondkuponon al personoj bezonantaj kaj ne povantaj akiri tujan kajeron. La vendoprezto de la unuopaj kuponoj aĉeteblaj nur ĉe Delegito estas 35 centimoj por 30, 55 por 50 centimoj kaj frankoj 1.10 por tiu de 1 franko.

Pri la administrado de tiu ĉi nova servo la Direktoro submetis al la Komisiono de UEA internan regularon, kiun ĝi akceptis dum novembro 1926.

Estu la Esperantista Respondkupono nova helpilo por la plifaciligado de la esperantistaj rilatoj kaj trovu la nova servo de UEA ne nur aprobon, sed ankaŭ vastan uzon ĉe la esperantista publiko, forigante de nun la plendadon de delegitoj pri manko de aŭranko aŭ pago.

*) Mendojn oni sendu al UEA, 12 Boulevard du Théâtre Genève.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
CENTRA OFICEJO: 12, Boulevard du Théâtre, GENÈVE (Svislando)

ESPERANTISTA RESPONDRUPONO

Por internacia aŭranko de unu letero 20 grama

VALORO: 30 centimoj svisaj
N-ro _____

Akceptita de la Centra Oficejo de UEA por aŭranko, kofitoj kaj mendoj ĝis la 31 Decembro 1929.

GENÈVE
la 1an de Decembro 1926.

Hans Jakob
Direktoro

Post la Unua Mondmilito, kiam en multaj ŝtatoj de Eŭropo estis inflacio kaj malfaciligado sendi monon al eksterlandoj, UEA kreis Esperantistajn Respondkuponojn.

La Esperantistaj Respondkuponoj estas presitaj en nigra koloro kun diverskolora subpresado por tri valoroj:

0,30 svisaj frankoj – flavebruna,
0,50 sfr. – blueverda,
1,00 sfr. – ruĝa.

Fonto: Hans Jankowski; "Esperanto-mono" dua kaj kompletigita eldono, p. 22

TERMINARO

Alfabeto listo (31)

aŭkcia katalogo: *katalogo, kiu enhavas menciojn pri moneroj, medaloj kaj bankbiletoj, aŭkcie aĉeteblaj. Ekde la 19a jarcento ĝi aldone enhavas valortaksojn kaj bildojn.*

aŭkcio: *procedo de vendo per publika konkurso, ĉe kiu la proponanto de la plej alta prezo akiras la vendataĵon.*

cizeli: *retuŝadi per skulptiloj fanditajn objektojn, i.a. monerojn kaj medalojn.*

devoto-medalo: *fiksebla aŭ surhavebla medal(et)o kun religia temo.*

EN: *“Esperanta Numismatiko”. Organo de ENA kun unua jarkolekto en 2014.*

ENA: *Esperanto-Numismatika Asocio. La unua fakasocio pri esperanta numismatiko en la historio. Fondita en 2012.*

internen: *subsurfacen aŭ kave metita teksto aŭ bildo. Sur monerstampoj la bildo evidente estu internena kaj krome spegulobilda.*

fiksebla medalo: *ordeno aŭ alia medalo fiksebla aŭ pendigebla sur vesto.*

katalogo: *kompilaĵo, kutime kun denombra funkcio. Enhavas klare montratajn samspecajn informojn. Pro ege ofta manko de klarigoj (historio) ĝia ĉefa malavantaĝo estas la manko de kuntekstoj!*

kolekto-katalogo: *katalogo pri objektoj de samspeca privata aŭ muzea kolekto.*

kolekto: *kvanto da samspecaj objektoj, sisteme aranĝitaj kaj pristuditaj.*

loko-medalo: *ĝenerala termino por nefiksebla aŭ ne surhavebla medalo. Do sen pendigilo (okuleto) aŭ pinglo.*

monproduktado: *la procedo por pregi monerojn.*

negoco-medalo: *monerspeco iam speciale pregita por la internacia komerco. Plejparte sen nominala valoro, do surbaze de la metalvaloro (oro aŭ arĝento).*

ponsuno: *reliefa stampileto, per kiu partoj – kiel stangetoj, trianguloj kaj arketoj – estis aldone kaj permane stampitaj en la monerstampoj.*

prezo-katalogo: *aktuala katalogo, kiu mencias la prezojn laŭ diversaj kategorioj de konservado. Jaron post jaro ĝi reaperas kun pli aktualaj prezindikoj.*

tablo-medalo: *origine termino por kalkuljetonoj, pasintec metitaj sur tablon por krei valorkategoriojn. Nun ankaŭ sinonimo por “loko-medalo”.*

vendo-katalogo: *ekde la 19a jarcento aperis ankaŭ vendcelaj katalogoj kun fiksa prezoj.*

Ĉu baldaŭ la definitiva kraŝo de la kriptamono?

“Ekde la pasintaj monatoj furiozadas manko kaj mizero en “Kriptolando”. La bitmono, la admiralsĥipo de la kriptofloto, perdis 70 procentojn de la pintovaloro en 2021. Aliaj kriptomoneraj eĉ perdis pli, ĝis 90 procentoj! Milionoj da trokredemuloj, kiuj revis pri rapide akiritaj trezoroj, ne plu scias, kien turni sin... Kio do okazis?

La kruta leviĝo de la kriptovaloroj kaj la aktuala kraŝo estas tipaj ekzemploj de financa sapveziko, kiel okazis jam tiel ofte en la historio.

La naskiĝo de tia sapveziko okazas pro nova teknologia evoluo. En la 19a jarcento tiel rolis la fervojo. Je la fino de la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento sin prezentis la IT-revolucio. Nun ni vivas en la epoko de la t.n. blokĉena teknologio. Tiaj novaj teknologioj ofte kaŭzas esperojn pri eksterordinaraj perspektivoj. La trajno tie malfermis novan mondon de rapida kaj komforta transporto; la IT-revolucio kreis fascinajn revojn pri novaj komunikiloj, la blokĉena teknologio pri novaj pagiloj, kiuj anstataŭigu tiujn uzitajn dum pli ol 2000 jaroj, monerojn kaj bankbiletojn.



Tiaj novaj teknologioj evidente allogas al senbrida profito. Ne al moderaj rendimentoj, sed al 20, 30, 40 procentoj jare, eĉ multe pli. Tiaj rendimentoj do havas altiran forton senliman. La revo pri baldaŭa riĉeco instigegas la fantazion de multaj pretendataj investantoj. Ekiriĝas amasa investo-ondo. La prezoj de la akcioj de firmaoj pro tio eksplodas.

Je la komenco esperoj veriĝas. Tamen la tago de la malebriigo proksimiĝas. Certaj firmaoj riskis tro aŭ tutsimple mistifikis la akciulojn kaj pereas. Jen la komenca paŝo al renverso de la merkato. Tuj iĝas klare, ke la ekscesaj valoroj ne respondas al la reala valoro, kaj ke ili sin apogas nur sur revoj kaj fantaziaj fabloj, kiuj aspektas veraj por trokredemuloj. Kraŝego kaŭzas katastrofon!

Nenio nova sub la suno, ĉu? Tamen, jes! La fervoja organizo kaj la IT-revolucio estis la bazo de novaj ekonomiaj perspektivoj kaj kreis pli grandan prosperon. “Kriptolando” promesis revoluciajn ŝanĝojn en la sistemo de financoj. Domaĝe, sed estis falsa profetaĵo.

Por kompreni, kial kriptaj monoj neniam estos ĝenerale akceptitaj pagiloj, necesas kompreni, kio estas la esenco de monoj. Monoj estas kaj pagilo kaj kontunuo. Kiel pagilo ĝi estu ĉipa. Tial oro malaperis kiel pagilo. Estis ege multekosta operacio elfosi, fandi kaj prilabori oron. Produkti la aktualajn pagilojn estas relative ĉipa operacio. Kriptaj monoj retrokatapultas nian socion al la mezepoko. Por krei ĝin, oni bezonas amason da energio kaj uzi ĝin kostas multe pli da tempo. Uzi kriptan monon do tute ne estas revolucia strategio, sed la plejble multekosta maniero produkti monon.

Kutimaj pagiloj estas krome kontunuo, kiu ebligas kompari reciproke la (ekonomian) valoron de produktaĵoj. Sen tia kontunuo preskaŭ ne eblas direkti la ekonomion. Kontunuo estas nur fida valoro, se ĝi estas stabila. Nu, kriptaj monoj estas ege malstabila.

Tria propreco de nekriptaj monoj estas, ke ĝia uzo estas bazita sur fido. Ĉiu persono, kiu negocas, devas havi la certecon, ke akceptos alian monon ĉiu ajn kontraŭa partio. Necesaj kondiĉoj por realigi tiun fidon estas, ke la aĉetpovo de la pagilo estas (grandparte) stabila. Jen tamen la Aĥil-kalkano de la aktuala oficiala monoj. Inflacio povas esti la sabotilo...

Ŝajnis, ke la kriptaj monoj en tiu kampo havus avantaĝon. La kriptaj sistemoj fakte ne bezonas la kunlaboron de la aŭtoritatoj. La libera merkato ja solvas tiujn problemojn. Tamen, ankaŭ tio montriĝis esti senvalora espero. La kreado de kriptaj monoj nur eblas, se oni disponas je la kunlaborado de tuta armeo de perantoj. Ne estas certe, ke tiuj perantoj – sen iu minimuma reguligo – estas pli fidindaj ol la aŭtoritatoj ...!”



Verkisto: Paul De Grauwe, belga profesoro ĉe la “London School of Economics”. Artikolo el la belga gazeto “De Morgen”.

Elnederlandigis: Bert

EL LA GAZETARO

Estas dauxre revenanta temo: cxu ne eblas apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio, almenaux inter esperantistoj? Cxu oni ne povas fondi esperantistan bankon aux servocentron, simile kiel Hodler origine intencis kun UEA? Almenaux parto de la respondo eventuale estas la Esperantistaj Respondkuponoj el 1927, nun rarajxo por kolektantoj, tiam disputajxo inter UEA-gvidantoj.

La problemo – la solvo

Internacia perado de mono estis problemo ankaux en la tempo post la Unua Mondmilito, kaj ecx pli granda ol antauxe, cxar malaperis la Latina Monunio (inter pluraj romanidaj landoj) kaj la superrego de la stabila brita pundo. La Internaciaj Respondkuponoj de la Universala Posxta Unio estis utilaj, sed havis grandan malavantaĝon: la kuponoj kostis dudek procentojn pli ol ili valoris. Por la origina celo (kovri la koston de letero) tio akcepteblas, sed kiel pagilo la sistemo tro multekostas. Cetere la kuponoj haveblis nur en kelkaj landoj kaj nur en iom grandaj officejoj.

En januaro 1927 la gazeto *Esperanto* prezentis la solvon de tiu problemo: „Esperantista Respondkupono“. Pro legxoj ne eblas krei esperantistan cxekon aux biletan, klarigis UEA-direktoro Hans Jakob: siatempe la Esperantista Cxebanko devis zorgi pri okaza nesuficxo de bonhavo. La nova Esperantista Respondkupono, eldonita de UEA, validas dum tri jaroj, kaj gxĭ estis havebla en kajero de dek biletoj po 30 centimoj, ses biletoj po 50 centimoj, tri po 1 franko (do entute valoris 9 frankojn). Kajero kun sendo al mendinto kostis 10 frankojn.¹³

¹³ ¹³ *Esperanto*, 1927, januaro, interna pago de la cxirkauxa kovrilo.

Avertoj en drasta vortumo

Kiam Hans Jakob en 1925 komencis plani siajn kuponojn, li interkonsiligxis kun la Honora Prezidanto de UEA, Eduard Stettler. Stettler estis juristo, stagxis en 1909-11 en Gxenevo cxe Hector Hodler, kaj poste farigxis direktoro kaj prezidanto. La officeja organizo, la statuto de 1920 – atingajxoj de la severa kaj precizema sviso el Berno. Gxis sia morto en 1940 li konsiladis al Jakob, ofte en drasta kaj rekta germanlingvajxo. La 22an de junio 1925 li skribis al Jakob:

„Via plano pri monbiletoj renkontas tiom malnovan konaton, ke oni lauxdece salutas gxin germane, anstataux en formala Esperanto. Kion vi liveras, tio estas je la penikpunkto tiu penso kiun mi antaux ikso da jaroj cerbumis kun amiko Hodler sur la trotuaroj de Gxenevo, gxis unu nokton iu kolera virino kriis al ni, ke tiaj vagabondoj estu en la lito aux en la malliberejo. Tio ne havu rilaton al vi.“

La posxta vendas siajn kuponojn kun dudek procentoj da profito, gxĭ stampumas je kontrolo, liveras transportlaboron kiu ne estas kroma laborsxargxo, klarigis Stettler. Sed UEA laux la plano de Jakob prenas dek procentoj, mem pagas la sendon, ne povas kontroli, librotendas je altaj kostoj kaj estas respondeca al cxiu bonkreda ricevanto.

Principe: Oni ne povas enspezi per bagatelajxo. La esperantistaro flantazias ke gxĭ povas labori pli efike ol posxta aux bankoj aux komercistoj. „Sed ili kapablas kalkuli, kaj la esperantistoj ne povas. Jen la afero. [...] Per tiu ajxo vi rajdas la UEAn en financan aventuron, ruinigas profunde gxian bonan reputacion [...]. Antaux ol vi komencas tiel, vi pendu flnajxon cxirkaux vian kolon kaj iru vendi alumetojn kaj sxurubandojn cxe dompordoj.“¹⁴

¹⁴ AdUEA: T02-010, Stettler-Jakob 1924-1928: Intero de Stettler al Jakob, 22an de junio 1925.

La deziro de la esperantistoj

Jakob respondis ke li tralegis tiujn konsiderojn, sed jam rifuzis ekzemple la averton de Stettler, ke iu litografo povas represi falsigitajn kuponojn. La UEA-kuponoj estas vendeblaj nur inter esperantistoj, laux Jakob, kaj falsigado indas nur en amasa presado.¹⁷ Ne, kontrauxis Stettler en plia letero, senlabora litografo kontentigas ankaux pro eta gajno, kaj kvalita falsajxo ne bezonas grandegan penon.

Stettler donis ekzemplojn pri eventualaj problemoj de la kuponuzantoj: „Kiel statas pri rekompenco, kiam mi („mi“ estas en tiuj kazoj cxiam sagaca delegito en Galicio) postulas post tri monatoj dudek novajn kajerojn, sub la preteksto de vigla trafiko kun esperantistoj? Kiu pagas la afrankon kaj kiel vi kontrolas cxu mi uzas la ajxojn aux vendaxas ilin intersxangxante ilin je posxtmarkoj aux io alia?“ Aux: Sinjoro X havas dudek frankojn en kuponoj kaj volas pagi al delegito je 12 markoj aux 300.000 kronoj. Kiu kurzo?

En la realeco, la perantoj kaj komercantoj akceptos la kuponojn je fiksa, sed malpli alta valoro, je la malkontento de la esperantistoj. La delegito devas akcepti la kuponojn, laux la plano de Jakob, sed ne cxiu delegito konsentos kun tio, avertis la Honora Prezidanto.

Jakob versxajne pensis – tion oni ne trovas eksplicite en la korespondado – ke UEA povas krome nerekte profiti je la kuponoj: Se iu kuponacxetinto iel perdos kuponon aux neniu responstulos la kontrauxvaloron cxe UEA, tiam UEA sxparas. Sed Stettler opiniis: Perdo de tiuj kuponoj „estus por ni damagxo, ne profito. La perdinto kolerigxos pri UEA. [...] Nur unu afero estas certa: Cxiu, kiu perdos per tiuj kuponoj monon, kaj da ili estos multaj, sakros kaj tiel subfosos

¹⁷ AdUEA: T02-010, Stettler-Jakob 1924-1928: letero de Jakob al Stettler, 23an de junio 1925.

nian bonan reputacion. Tion kelkaj cent frankoj da ebla profito neniam indas.”¹⁸

La Direktoro tamen kuragxis dauxrigi la projekton, sed akceptis ke la kuponoj devas havi tempan limon. En tiu epoko la financa situacio de UEA estis ne tre rozkolora, preskaux cxuijare oni spertis deficiton. Per la Esperantistaj Respondkuponoj Jakob celis stimuli la librovendadon. Kaj li kredis ke la esperantistoj sentas bezonon je tia pagilo. Stettler: „La deziro de la esperantistoj ne estas gvidmontra, al la plej multaj mankas ideo pri la praktiko.”¹⁹

¹⁸ AdUEA: T02-010, Stettler-Jakob 1924-1928: letero de Stettler al Jakob, 25an de junio 1925.

¹⁹ Samloke.

La praktiko

En februaro 1928 la germana bankisto kaj Esperanto-aktivulo Anton Vogt subskribis sian raporton pri la funkciado de Centra Oficejo de UEA. Li informis al la Estraro pri la kvalito de la laboro de prezidanto Privat kaj direktoro Jakob, kaj menciis ankaŭ la respondkuponojn. Laŭ li la kuponoj fakte ne atingis grandan popularecon. Jakob estis dirinta al li ke cirkulas kuponoj por ĉirkaŭ mil frankoj, kovrataj de sumo deponita en banko.²⁰

Ses jarojn poste, dum la stokholma kongreso, la malnovaj, svisaj gvidantoj de UEA abdikis. La nova Estraro sub Louis Bastien en septembro 1934 eksciis ke, laŭ la nova direktoro Robert Kreuz, la Asocio apenaŭ plu havas monon kaj ke ekzistas neniu kovro por la eldonitaj respondkuponoj. Tio estas sufiĉe proksima al nelegxeco, ĵugxis Kreuz.²¹

²⁰ AdUEA: T06-075: Anton Vogt: Nepre konfidenca raporto pri mia kontrolo ĉxe la Universala Esperanto-Asocio en Gjenevo, subskribita la 2an de februaro 1928, p. 4

²¹ AdUEA: T020-010, Bastien-Kreuz 1934-1936: letero de Kreuz al Bastien, 2an de septembro 1934.

171

En aŭgusto 1936 Bastien faris ankoraŭ grandajn riprocojn. Li asertis, Stettler informis al Jakob, ke la kuponoj ne estis en la bilancoj kiel pasivo, ke ne estis farita inventaro de la venditaj kaj redonitaj kuponoj. Kaj laŭ franca legxo la kuponoj estas malpermesataj, estante bankbiletoj. Fine de 1936 la lastaj kuponoj transiros la limdaton, diris Bastien, se ĝxis tiam ankoraŭ revenos iuj, li lasos Jakob pagi ilin el propra posxo.²²

La Esperantistaj Respondkuponoj do funkciis (aux ne) dum proksimume dek jaroj. De 1937 ĝxis 1947 ili restis arkaikajxo en la statuto de 1934, kaj kun la akcepto de nova statuto 1947 ili farigxis historiajxo. Cxu ili serioze kontribuis al la UEA-deficitoj de la koncerna epoko, estas dubinda. Sed la kuponoj diras ion pri la kreemo kaj obstino de Hans Jakob.

²² AdUEA: T03-200: letero de Stettler al Jakob, 20an de aŭgusto 1936.

172



Ilustraĵoj aldonitaj de la ENA-redakcio

La redakcio kore dankas Roland Rotsaert pro la sendo de la artikolo.

REPOŝTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

17.06.2022 15:38

Kara Jozefo,

Por eviti la epokon de la ferioj, mi jam nun sendas al vi la malnetan version de numero tri. Ĝi estas publikigende je la fino de julio, do restas al vi sufiĉe da tempo, mi esperas. Mi evidente jam kore antaŭdankas vin kaj esperas ankaŭ, ke la artikoloj estas bonkvalitaj kaj lingve en ordo.

Kun koraj kaj numismataj salutoj,

Bert

24.06.2022 15:53

Kara Bert,

estas firma vero, ke numismatiko instruas al ni la kulturhistorion de la mondo. Se mi ne legus vian/nian revuon, neniam mi eksciis pri la interesa fakto: interrilato de la parizaj framasonoj kaj Esperanto aŭ pri hobo nickel aŭ la sprita medicino kontraŭ senmoneco, elpensita en Wörgl.

Kvankam la provlegado de la ENA-revuo signifas por mi pluslaboron, ĝia legado estas vera ĝuo. Do kiel vi, mi same dankas vin! :-)

Kun amikaj salutoj: Jozefo



13.06.2022 12:17

Estimata s-ro ĉefdelegito, kara samideano,



Aldone mi sendas skanon de glumarko el Liberec (Reichenberg) 1906.

Mi intencas fari artikolon por la ENA-revuo pri la evento kaj, se eble montri per foto aŭ desegno la preparolatan "oran medalon".

Mi do petas vian helpon por havigi al mi plejeble kompletan informon pri la evento kaj pri la medallo.

Kore mi antaŭdankas vin!

Amike kaj numismate,

Mag. Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"

Fakdelegito pri numismatiko

18.06.2022 9:25

Kara samideano,

pardonu mian silenton. Mi estis en malsanulejo kaj faris nur verajn urĝaĵojn.

Bedaŭrinde pri la ekspozicio mi scias nenion, sed mi sendas kopion al Miroslav Malovec, kiu skanas multajn historiajn periodaĵojn, ĉu li hazarde povos helpi.

Amike al ambaŭ, Petro

18.06.2022 16:53

Karaj amikoj,
pri tiu medalo kaj pri tiu ekspozicio mi neniam aŭdis, ĉar inter 1904-1907 funkciis en Bohemio neniu esperanto -gazeto.

Mi tamen trovis en Guglo informojn pri la ekspozicio (Liberec výstava 1906)

https://www.google.cz/search?q=v%C3%BDstava+v+Liberce+1906&sxsrf=ALiCzsZx2DcSV4wkWYC3hY8WtUDNvK-v8A%3A1655563329762&source=hp&ei=QeStYrnqK9He7UPqqihgAo&iflsig=AJiK0e8A AAAAYq3yUbu7Hfb3Hc8X_b8acOPm_JgaRPGA&ved=0ahUKEwj5jq-Bnrf4AhVR77sIHSpuCKAQ4dUDCAY&uact=5&oq=v%C3%BDstava+v+Liberce+1906&gs_lcp=Cgdnd3Mtd2l6EAMyBggAEB4QFjoECCMQJzoFCAAQgAQ6CwgAEIAEELEDEIMBOhEILhCABBCxAxCDARDHARDRAzoOCC4QgAQQsQMqXwEQowI6CAgAEIAEELEDOggILhCABBCxAzoICAAQsQMqgwE6EQguEIAEELEDEIMBEMcBEK8BOg4ILhCxAxCDARDHARCvAToLCC4QgAQQxwEQrwFQAFiLRGDBSGgAcAB4AIABe4gBnA-SAQQxNS43mAEAoAEB&sclient=gws-wiz

Sed pri Esperanto nenia mencio.

Mirek

18.06.2022 16:58

P.S. Ankaŭ germanlingve

<https://reichenberg.de/deutsch-boehmische-ausstellung-1906-bericht-aus-liberecreichenberg/>

18.06.2022 19:17

Jen tamen ege interesaj informoj kiel bazo por ENA-artikolo.

Kore mi dankas vin ambaŭ kaj deziras al Petr baldaŭan kompletan resaniĝon!

Amike kaj numismate,

Bert

19.06.2022 8:37

En Lingvo Internacia mi trovis mencion, ke la klubo en Reichenberg havis 80 membrojn (7a linio) en 1906.

En la ĉeĥa gazeto Čas (= tempo) disponebla rete por studaj celoj mi trovis informon el 1906-05-17, ke la ekspozicio estis malfermita.

Sed alian mencion mi ne plu trovis (ĝi daŭris ĝis la 30-a de septembro).

Do ankaŭ ne pri medaloj. Ĉeĥoj perceptis tiun ekspozicion kiel kontraŭĉeĥan.

M. Malovec

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.07.2022 17:41

Kara Bert!

Dankon kaj gratulon!

Kun plej amikaj salutoj kaj bondeziroj

Ludoviko Molnár

prezidanto de la 53-jara

Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

17.07.2022 3:05 PM

dankon, kiel ĉiam
via fidela traleganto
renato

29.07.2022 13:45
*Karaj Ludoviko kaj Renato!
Koran dankon pro viaj afablaj reagoj!
Amike kaj numismate,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.07.2022 18:42
Dankon!
Feliĉan someron ankaŭ al vi!
<https://kongreso.esperanto.it/89/>
Luigi Fraccaroli
prezidanto de Breŝa Esperanto-Grupo

29.07.2022 13:44
*Karaj samideanoj!
Multan dankon pro via afabla reago!
Amike,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.07.2022 18:54
Dankon Bert,
Mi vidis vian artikolon pri skoltoj kaj Esperanto.
Superbe!
Salutojn,
Johan

29.07.2022 13:44
Kara Johan(o)!
Koran dankon pro viaj afablaj reago kaj kunlaboro!
*Amike,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

17.07.2022 19:36
Kara Bert
Elkoran dankon pro la numismatika revuo.
Ĝi troviĝas jam en la kolekto.
<https://wikiflandrio.alcl.be/bezoek/rena/ena-j9n3-202203.pdf>
Kun afablaj salutoj,
Albert

29.07.2022 13:40
Kara Albert!
Multan dankon pro viaj afabla reago kaj daŭra kunlaboro!
*Amike kaj numismate,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

18.07.2022 11:11
Dankon pro la revuo!
Mi trovis en ĝi bjalistokan akcenton: monumenton de juna Zamenhof.
Amike
Maria Niemyjska

29.07.2022 12:20

*Mi dankas vin pro viaj afabla reago kaj kunlaboro, kara Maria!
Amike kaj numismate,
Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

29.07.2022 13:38

*Kara Ursula,
Pli bone iom malfrue ol neniam, do mi pardonpetas pro la prokrasto de la bondeziroj okaze de la jubileo de Bona Espero en la nomo de ENA kaj en mia propra nomo.
Ni gratulas vin, viajn kunlaborantojn kaj kunlaborintojn pro la grandaj rezultoj de via porinfana projekto!
Ni tutkore deziras al Bona Espero novan junecon surbaze de entuziasmaj novaj idealistoj!
Amike,
Mag. Fil. Bert Boon
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
Fakdelegito pri numismatiko*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

27.07.2022 9:25

Bert kaj Ivo,
En la antaŭ nelonge sendita ENA-revuo mi legas:
“Mi mem ie iam cedis mian medalon, eble lasis ĝin en skatolo kun arĥivaĵoj, kiuj iris al Fondaĵo Van Biervliet en Kortrijk. La plimulto de tiu fondaĵo revenis al Antwerpen, la nura ebleco por trovi ekzempleron verŝajne estas en Erfgoedbibliotheek.
Do eble vi informiĝu ĉe Cyreen Knockaert.”
Laŭ mia kompreno, la plej granda parto de la medaloj (kaj aliaj 'objektoj') alvenis en la Fondaĵo Vanbiervliet ĉ. 1980 okaze de la translokiĝo de FEL de Arsenaalstraat al Frankrijklei. Tiajn aferojn mi registris en 'Esperantokolekto' (<https://esperantokolekto.alcl.be/>), sed pro la likvido de la fondaĵo tiu laboro ne vere estis finpretigita. La kolekto nun troviĝas en LBS, atendante taŭgajn laborlokojn kaj volontulojn por daŭrigi la laboron kaj decidi kion FEL mem konservos kaj kion oni transdonos al aliaj arĥivoj. Serĉante en Esperantokolekto, mi trovis nur unu medalon: https://esperantokolekto.alcl.be/bezoek/object/obj_zoek_gevonden.php?obj_nummer=02.02.36.0&obj_name=antwerp . (1955, eble estis restanta stoko de malnovaj medaloj kiujn oni tiam disdonis.)
Okaze de la translokiĝo de Frankrijklei al LBS, tiaj aferoj estis transdonitaj al FelixArchief. Cyreen faris inventaron (aldone) en kiu estas menciitaj kelkaj medaloj. Indas surloke en FelixArchief plidetaliĝi tiun inventaron. Certe aperos nekonataj objektoj.
Roland

27.07.2022 10:32

Bert Boon fotis ĉiujn medalojn en FelixArchief antaŭ 3 jarojn.
Cyreen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.08.2022 17:54

Kara Bert!
Finfine mi sukcesis trovi tempon por legi vian ENA-revuon. Kion diri?
Ĉiu-foje post legado de via revuo mi eksentas senfinan miron kaj admiregon al vi. Nek Bulteno nek LVL kompareblas al ĝi. Ĉiu el ili estas io eksterordinara! Kiom mi lernas legante ilin!!! Dankon kaj dankon!!!

Ĉiu revuo estas granda kaj unika juvelo en via trezorujo (=la kolekto de la de vi redaktitaj revuoj).

Brakumojn al vi kaj Vivi, de Pino kaj mi.

Kompreneble vi estu ege dankata de mi pro la daŭra sendo de ligilo al grava glm-a materialo.

Ĉiam aperas tie io nova por nia katalogo.

Elda



10.09.2022 8:24

Ĉu ne eblas apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio?

Karaj,

La aldonitan artikolon mi trovis en Esperanto-arĥivo; estas fotokopioj sen indiko de la titolo de la revuo. Mi supozas ke ĝi aperis ĉirkaŭ la jara 2000. Ĉu iu konas la revuon?

La demando restas aktuala, sed enhave (esperantistaj respondkuponoj el 1927) la teksto nur havas historian valoron.

Roland Rotsaert

10.09.2022 8:24

Saluton Roland,

Tre interesa artikolo pri esperantaj respondkuponoj por ENA, kiu estos publikigata en la rubriko "El la gazetaro". Bedaŭrinde mi ne scias en kiu revuo kaj kiam ĝi aperis. Strange estas la revua ortografio pere de x anstataŭ ^ en revuo el 2000, ĉu ne?

Bert



10.09.2022 3:20

Estimata, saluton!

Kiel vi fartas? Mi esperas, ke bone. Antaŭe vi estis individua membro de UEA. Ni tre aprezas, ke UEA kalkulis je vi en Belgio. Do dankon pro via ĉeesto!

Ni ŝatus scii: ĉu estas eble al vi realiĝi ankaŭ por 2022? Tio multe subtenas nian laboron tutmonde, speciale ĉar donas al ni legitiman forton reprezenti vin kaj esperantistojn en forumoj de UN, Unesko kaj aliaj instancoj. Se jes eblas al vi realiĝi, ni kore invitas vin uzi la retan aliĝilon: <https://uea.org/alighoj/alighilo> Aliĝo kiel MA estas aparte bonvena. Eventuale konsideru aliĝojn kiel DMA aŭ DMB kaj al iniciatoj kiel Societo Zamenhof kaj Alianco 365. Ankaŭ patroniĝo en TEJO kaj abono al Kontakto bonvenas: <https://uea.org/alighoj/abonilo>

Se eventuale vi havas malfacilecon, inkl. financan, aliĝi, ne hezitu rekontakti. Ni trovos solvon. Ankaŭ se vi deziras proponi kunlaboron kadre de UEA, estos plezure diskuti pri tio.

La 108-a Universala Kongreso okazos en Torino: estas speciale avantaĝe aliĝi nun por ĝui la plej rabatitan kotizon (ĝis la 31-a de decembro 2022) kiel individua membro: <https://uk.esperanto.net/2023>.

Kore kaj samideane,

Fernando Maia Jr.

Universala Esperanto-Asocio | Vicprezidanto

10.09.2022 11:34

Estimata Sinjoro Vicprezidanto,

Via letero klare ne direktiĝas al mi persone, ĉar mi estas ne nur membro de UEA, sed eĉ FD pri esperantologio, numismatiko Esperanta kaj pedagogio dum multaj jaroj.

Eble vi volas nur varbi por la UK en Torino...

Mag.Fil. Bert Boon

Iniciatinto de Esperanto- Numismatika Asocio (ekde 2012 ENA)

Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko" (jarkolekto naŭa)

10.09.2022 13:51

Kara Bert,

Mi pardonpetas pro la ĝeno, ĉar efektive, kiel vi klarigis, vi estas aktuala membro de UEA. Vi ricevis tian mesaĝon, ĉar via adreso restis ligita ĝuste al la Esperanto-Numismatika Asocio, kiu restis en mia listo, post forfiltrado de aktualaj membroj.

Do mi petas pardonon pro tiu ĝeno.

Mi tamen uzu la okazon por informi, ke mi interesiĝas pri ENA. Ĉu estas io, kion ni en UEA povas fari por pli subteni la agadon de ENA? Ĉu vi eventuale ŝatus esti intervjuita por la revuo Esperanto por rakonti ĝenerale pri numismatiko kaj la agadon, historion kaj staton de ENA? Ĉu en Belgio estas mem nacia asocio/societo de Numismatiko kaj ENA kun ĝi kunlaboras? Ĉu estas/is/povas esti kunlaboro kun numis.org por diskonigi Esperanton inter numismatoj en la mondo?

Mi ĉiel ajn deziras kuraĝon kaj repardonpetas!

Via,

Fernando Maia Jr.

Universala Esperanto-Asocio |Vicprezidanto

11.09.2022 13:45

Kara Fernando,

Tute ne indas pardonpeti pro iu ĝeno, male! Via respondo estas multvalora propono al kunlaboro inter UEA kaj ENA. Ekde la fondo de ENA (2012) subtenis ĝin diversaj personoj kiel Renato Corsetti, Ludoviko Zaleski Zamenhof k.a., kaj via persona intereso estas ege pozitiva kaj instiga aldono.

Neniam antaŭe ni ricevis inviton al intervjuo por la revuo Esperanto kaj evidente ni akceptas ege volonte vian proponon tiurilatan. Kiel tio estu organizota mi lasos decidi vin mem.

Por Belgio la societo "Numismatica Tienen" (en la samnoma loka urbo kie mi loĝas kaj kies membro mi estas) invitis min prelegi pri ENA. Ankaŭ ĉe "Numismatica Diest" mi jam prelegis kaj ĉe "Numismatica Herentals" mi prezentis ekspozicion. Mi estas krome membro de la eŭropa asocio pri numismatiko EGMP kaj sukcesis publikigi ampleksan, ilustritan artikolon pri la Esperanta Numismatiko en la Jarlibro 2018.

Ĝis nun ne okazis kunlaboro kun numis.org por diskonigi Esperanton kiel lingvon de numismatiko, sed kio ne estis povas okazi baldaŭ, sendube kaj volonte!

Aktuale ENA havas 155 individuajn membrojn en 44 landoj kaj 25 asociajn membrojn, el kiuj ankaŭ la numismatika sekcio de la Viena Universitato, UEA mem kaj pluraj esperantaj kaj eĉ ne-esperantaj muzeoj kaj bibliotekoj. Ili ricevis la membrecon kaj ricevas la retan revuon "Esperanta Numismatiko" ambaŭ tute senpage.

Do, estas diversaj interesaj aspektoj por nutri ampleksan intervjuon, mi supozas.

Dankon al vi kaj antaŭdankon pro ĉio kiu estus ebla.

Amike kaj numismate,

Bert

13.09.2022 8:31

Kara amiko,

via respondo min ĝojigis. Kompreneble mi akceptas membrigon al ENA. Mi tuj serĉis la de vi menciitajn numerojn de la ENA-gazetnumeroj. Mi certe uzos ilin kiel bazon por mia kontribuo al la ĉeĥlingva numismatika revuo cele informi ĉeĥajn numismatikojn pri rilato inter E. kaj numismatiko. Mi pripensis jam enhavon: Esp.-numismatikaj organizaĵoj, oficialaj moneroj rilataj el Esp-o, universalaj Esp. monistemoj (spesmiloj kaj steloj) medaloj kaj fine insignoj (ĉar en nia lando ekzistas ĉe oficiala numismatika asocio ankaŭ fako de kolektantoj de insignoj, oni nomas tion "eta skulptaĵo".) Por vin informi pri mi: Mi estas esp-isto ekde la jaro 1948 (tiam mi estis 12 jara), numismato mi estas ek de la jaro 1979. Nun mi estas honora membro de Ĉeĥa Esperanto Asocio, ankaŭ de Ĉeĥa Numismatika Asocio. Nia num. asocio eldonis okaze al mia naskiĝdato medalon –ĝian fotografaĵon kun la ĉeĥlingva priskribo mi almetas. Mi estas longjara delegito de UEA (de la j. 1973) kaj i. a. ankaŭ pri fako numimatiko (vidu la Jarlibron). Pluajn informojn mi povas sendi laŭ via bezono.

Amike,

Vlastimil



☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

A N O N C O J
&
E V E N T O J

EID MAR: la plej fama monero en la historio



La famegaj ora aureus kaj arĝenta denario de Brutuso, la t.n. “eid mar” (el la latina: EIDibus MARtiis) estas rarega monero eldonita de Marko Junio Brutuso, inter la 43a kaj la 42a jaroj antaŭ la okcidenta areo. Ĝi estis kreita memore je la morto de la murdita famega diktatora imperiestro Gajuso Julio Cezaro, la 15an de marto de la jaro 44. Ambaŭ montras profilan buston de Brutuso kaj la surtekston *L. PLAET. CEST TRVT IMP* [= L. Plaetorius Cestianus (=magistrato) *BRUTUS IMPERATOR*]. Reverse oni vidas du malsimilajn ponardojn (= por du diversaj murdistoj) kaj Pileus-kapveston (ĉapon) kiun rajtis surhavi liberigitaj sklavoj en la romia imperio. Poste ĝi iĝis ĝenerala simbolo de libereco.

Oran ekzempleron ricevis la altaj oficiroj, arĝentan la simplaj soldatoj. Restas preskaŭ cent arĝentaj ekzempleroj kaj tri oraj, ĉar en la pasintaj du mil jaroj multaj estis refanditaj pro la metala valoro. La aureus kaj la denario mezuras 19,9 mm, la unua pezas 8,06 g, la dua 3,6 g.

La tria konata ora ekzemplero, kaj la nura kun trueto, verŝajne estis adaptita por esti uzata kiel pendaĵo. Tiu juvelo ankaŭ emfazas la famon kaj la socian valoran de la monero!

La truita ekzemplero antaŭ nelonge en aŭkcio estis vendita kontraŭ preskaŭ tri milionoj da eŭroj. Ĝi do estas la plej multekosta kaj rara romia monero en la mondo.



Posedas la Deutsche Bundesbank



Posedo de la The British Museum

Jubilee De Esperanto: Zamenhof 1912 Silver Coin Jubilee De Esperanto: Zamenhof 1912 Silver Coin



Prezo: US \$120,00 — rabata prezo: US \$93,60

Sendokostoj: US \$24,31

Importkostoj: US \$30,12

Aŭkcio: 2022

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojefoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol naŭ jaroj ĝis 155 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be